# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Bob Felby**



**PLENUMITA 29/09/2022 Sescentdua eldono (unua eldono 20/09/2011)**

## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**
Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ http://thesaker.is/

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 682,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo

Nun studas **299,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **155,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **137,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018
Nun studas **91,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )



## Esperanta Retradio



DONAS BONAN ĈIRKAŬ-5 MINUTAN AŬSKULTADON KAJ LEGADON ĈIUN TAGON

**MONDSKALE KRESKANTA TRODIKECO BREMSAS EKONOMION**

24-a de septembro 2022

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondecas pri via sano, do portu maskojn. *Roger Springer*

## Esperanta nov-farejo en la urbo-centro, frue en oktobro 2022 Adelajdo

Mi penas instrui Esperanton precipe al junuloj kaj do denove sur strat-muro de The Innovation Factory mi utiligos artaĵon. Apud la voj-angulo de King William St kaj Halifax St en la urbo-centro de Adelajdo la juna Zamenhof okulnivele de preterpasantoj invitos komencantojn per ĉi-suba mur-ŝildo.



L L Zamenhof. UNESCO nominee 2017. Nobel nominee dek foje

**ESPERANTO TUITION AND PEDAGOGY HERE. TEL: 0448515234**

Tute neatendite, sed bon-aŭgŭre, la manaĝero de the Innovation Factory proponis al mi reduktitan luadon de nov-farejo (*start-up*) por interalie instrui tie Esperanton. Mi volonte akceptis ĉar sukcesis mia operacio rilate diagnozon de stadio kvar de melanoma haŭt-kancero.

Bedaŭrinde, interalie pro delikata sano-stato ĉesigis mi instruadon tie antaŭ sep monatoj sed depost la 1-a de oktobro 2022 mi denove disponigos senpagan Esperanto-instruadon - kondiĉe ke intertempe ne eksplodu la tria mond-milito. ☹ Mi post nelonge informos Katrine Hildyard M.P. * kaj Magistratanon de la Urba Konsilantaro, Arman Abrahimzadeh O.A.M. pri la bona novaĵo kaj por re-inviti ilin Esperantistiĝi: Porinforme bonvolu vidi parton du de la jena ligilo:

https://www.bandeeducation.com/sidnejo_2022_esperantlingve

* https://esperanto.org.au/ftp-uploads/ESK-129-dec2017.pdf

(Parlamentanino oficiale rekomendas Esperanton al la tiama *shadow minister* pri Edukado, Susan Close; ambaŭ virinoj nun okupas oficon en la sud-aŭstralia ŝtat-registaro; p. 29 - 30.)

Kiel vi scias, mi ankoraŭ estas membro de la bahaa religio malgraŭ mia tridekjara kritikado de bahaaj gvidantoj pro tio, ke ili, kiel individuaj sekvantoj de Baha'u'llah, aŭ ignoras Esperanton aŭ pri ĝi ne komprenas instrukciojn en bahaaj tekstoj. Unu bahaa platformo sole elsendas tiurilate miajn zorgojn. Hazarde, nur lastatempe en la plej novaj komentoj aperas super-rigardo pri ilia sub-optimuma engaĝiĝo rilate Esperanton kaj konsultadon eĉ pri la principo de universala helplingvo mem: **https://bahaiforums.com/t/the-most-great-peace-shall-come.25561/** Ĝia kuraĝa redaktisto lasas stari mian vidpunkton, inkluzive de Esperanto-teksto. Bonvolu komenti el ne-bahaa perspektivo por ke la averaĝa bahaano enkapigos la gravecon de la zamenhofa lingvo ☺ Amike. *Paŭlo Desailly* (ne la Apostolo.)

## AE hodiaŭ estas iom malfrua ĉar mia interreto malfunkciis dum 5 tagoj

Donis al mi grandan kapdoloron! Mi pardonpetas *Roger Springer*



# TRAVIDEBLA LINGVO INTERRETE (*TRANSPARENT LANGUAGE ONLINE*)

estas senpaga lernoprogramo havebla ĉe pluraj biblioteko-retejoj en Aŭstralio, kaj Esperanto estas unu el la ofertitaj lingvoj.

Enketu, ĉu ĝi haveblas ĉe via loka biblioteko, kaj por komenci, sekvu ties retejajan registrigo-instrukciojn.

La kurso permesos vin komenci kaj halti kiam ajn, sen perdo de via pozicio, kaj aŭtomate kronikos vian progreson.

Ĝi taŭgas por komencantoj ĝis altgradantoj kaj povas esti studata per via hejma komputilo, tabulkomputilo (*tablet*) aŭ komputiltelefono (*Smartphone*).

Por tute interrilati, oni rigardas, aŭskultas, legas kaj ankaŭ parolas per mikrofono - vi povos enketi pri aliro al tiu per la biblioteka komputilo.

La Esperanto Ligo de Okcidenta Aŭstralio promocios T.L.I. ĉe *Have a Go Day* (Provu! Tago), grava ĉiujara okazo en *Perth*, ĉi-jare je novembro la 9a.



*Trish O'Connor* - esperanto@hotmail. Tradukis *Vera Payne*



Kara Marcel,

mi atente legis vian respondon.




En ĝi troviĝas grava eraro: Vi mencias logikon. Sed ni ne estas sur la kampo de natursciencoj. Ni estas sur la kampo de homaj aferoj, de historio kaj politiko.

Tie ne regas logiko, sed potenco kaj ideologioj.

Se la iamaj landlimoj estus argumento, Danlando povus postuli denove regi super tuta Svedujo, Norvegujo kaj Islando, por nur nomi la ĉefajn areojn. Se iu dana politikisto serioze postulus tion, ne daŭrus longe ĝis kiam ni povus viziti lin en malsanulejo por mensmalsanuloj.

Ĵus mi hejmenvenis de kruzado sur la Baltika Maro. Prepare al la ekskursoj oni sur la ŝipo montris diversajn filmetojn pri la urboj, kiujn ni estis vizitontaj. La spektantoj povis kompreni, ke la tuta regiono - ni diru inter Berlino kaj la rusuja landlimo - estis sub daŭra batalo. Foje regis la danoj, la svedoj, la germanoj, la poloj, en la orientaj partoj la rusoj.

Mia konkludo: El la historio oni povas gajni bonajn argumentojn - por krei aŭ fortigi naciismon kaj sekve konfliktojn kaj militojn, kiuj kostos homajn vivojn kaj detruon de valoroj.

Mia ideologio estas, ke homoj vivu laŭeble libere. Do, ke ili ankaŭ povu decidi mem pri sia sorto tiom kiom eblas. Do, diskuto pri ŝanĝo de landlimoj, aŭtonomio de regionoj ktp. povas okazi nur surbaze de la akcepto de la nunaj landlimoj. Konferencoj, en kiuj ĉiu el la partoprenantoj devas esti cedema, estas la sola solvo, se ni volas pacan mondon.

Amike, Peter Weide





Iam, sed bedaŭrinde antaŭ longe, eĉ longege, mi, kiel vi ĉiuj scias, estis juna kaj bela. Sed nun mi estas nur bela, eĉ belega!

Mi estis treege kontenta kun mia vivo. Mi laboris, pardonu "deĵoris" kiel noktogardisto en Mirinda Kopenhago. Inter aliaj gardataj konstruaĵoj, mi gardis ankaŭ la fifaman bierfabrikon "Carlsberg". Nu, kvankam tiuj, kies feliĉo dependas de drinkado de biero, mia vivo ankoraŭ ne estas tiom ridinda.

La fifabrikaĉo konsistas el pluraj konstruaĵoj, ĉiuj kun sufiĉe multaj elevatoroj. Mi do, kiel ordinara homo, plej ofte prenis la elevatorojn anstataŭ piediri supren kaj malsupren laŭ la ŝtuparoj. Iom post iom tio fariĝis tute normala por mi.

Sed, iun tagon la tuta loĝantaro de belega Kopenhago estis informita de la registaro, ke la gereĝoj de Britujo tre baldaŭ venos por viziti kaj rigardi kelkajn fifabrikaĉojn de belega Kopenhago, inter aliaj ankaŭ la bierfifabrikaĉon Carslberg.

Kia ĝojo, ĉu ne?

Sed troviĝis eta problemo, eĉ problemeto. Sur ĉiu elevatoro de Carlsberg, kaj estis multaj, eĉ multegaj, oni devis premi butonon. Tiam oni devis stari kaj atendi ĝis ruĝa lumo lumis. Sur la ruĝa lumo estis skribite "I fart". Tio estas dana kaj signifas: "moviĝanta". Kompreneble la elevatoro estis moviĝanta, kaj tre baldaŭ oni povos eniri ĝin.

Sed la kleruloj regantaj la fifabrikaĉon ne volis riski ofendi la britan reĝinon. Ili do, iel, sanĝis la ruĝan lumon kun vortoj al ruĝa lumo sen vortoj. Do nun, oni estis pretaj por akcepti la reĝan regantan paron el Britujo.

Sed tio signifis, ke mi, stulta kiel mi tiam estis, nun devis iri kaj provi ĉiun elevatoron en la tuta fifabrikaĉo. Mi apenaŭ havis tempon por sidi kaj ripozi iomete.

Sed fine venis la gereĝoj, kaj la tuta Kopenhago ĝojis, eĉ gojegis. Ĉiuj escepte de mi. Mi ankoraŭ ŝatus scii, kion la brita moŝtino pensus pri tio, kion signifas en la dana lingvo "I fart". Supozeble ŝi eĉ bonege sciis, kion tio signifas en ŝia lingvo, ĉu ne?

Sed eble estis bone de la danaj saĝuloj forigi la vortojn el la ruĝa lumo, kion pensas vi? *Bob Felby*





Antaû centro estas iama studento de kara Hazel Green, Kevin Robb. De la dekstro estas komencantino, Pam.



Sendis *Petro Danzer*

